WIKIPEDIA

Hagia Sofia

Hagia Sofia (greke **Ἁγία Σοφία**, turke **Ayasofya**) aŭ **templo de Dia Saĝeco** estas templo konstruita en Istanbulo, Turkio, nome kristana patriarka bazilika kirko, poste imperia moskeo, poste muzeo (*Ayasofya Müzesi*) kaj ekde la 10-an de julio 2020 denove moskeo. Temas pri unu el la plej konataj sakralaj konstruaĵoj de la mondo. El la dato de ties konstruo en 537 ĝis 1453, ĝi servis kiel Ortodoksa katedralo kaj sidejo de la Patriarko de Konstantinopolo,[1] escepte inter 1204 kaj 1261, kiam ĝi estis konvertita en romkatolika katedralo sub la Latina Imperio. La konstruaĵo estis moskeo el la 29a de Majo 1453 ĝis 1931. Ĝi estis tiam laikigita kaj malfermiĝis kiel muzeo en la 1a de Februaro 1935.[2]

Fama ĉefe pro sia enorma kupolo, ĝi estas konsiderata epitomo de bizanca arkitekturo[3] kaj oni diras ke ĝi "ŝanĝis la historion de arkitekturo".[4] Ĝi estis la plej granda katedralo de la mondo dum preskaŭ milo da jaroj, ĝis la Sevila Katedralo estis kompletigita en 1520. La nuntempa konstruaĵo estis origine konstruita kiel preĝejo inter 532 kaj 537 je ordonoj de la bizanca imperiestro Justiniano la 1-a kaj estis la tria preĝejo de Sankta Saĝeco kiu okupis la lokon, el kiuj la du antaŭaj estis detruitaj de revoluciuloj. Ĝi estis desegnita de la grekaj geometriistoj Isidoro de Mileto kaj Antemio de Tralles.[5]

La preĝejo estis dediĉita al la *Saĝeco de Dio*, nome *Logos*, nome la dua persono de la Sankta Triunuo,[6] kies patrona festo okazas la 25an de Decembro, nome rememorigo de la nasko de Enkarniĝo de la *Logos* en Kristo.[6] Kvankam foje referencata kiel Sankta Sofia (kvazaŭ ĝi estus nomita laŭ Sankta Sofia), ĉar *sofia* estas la fonetika literumado en Latino de la Greka vorto por saĝeco, fakte ties kompleta nomo en Greka estas Ναός τῆς Ἁγίας τοῦ Θεοῦ Σοφίας, "Sanktejo de la Sankta Saĝeco de Dio".[7][8]

La preĝejo enhavis grandan kolekton de relikvoj kaj montris, inter aliaj trajtojn, 15 m arĝentan ikonostazon. Ĝi estis la kerna sidejo de la Ortodoksa Kristana Eklezio dum preskaŭ milo da jaroj, kaj en tiu konstruaĵo okazis la ekskomuniko de la Patriarĥo Mikaelo la 1-a Kerulario fare de Humberto de Silvacandida, la papa sendito de la papo Leono la 9-a en 1054, kio estas plej komune konsiderata la starto de la Orienta skismo.

Hagia Sofia

Ekstera vido al Hagia Sofia

en Turkio

Bazaj informoj	
Loko	Istanbulo
Geografia situo	41° 0′ 31″ N, 28° 58′ 48″ O (https://tools.wmflabs.org/geohack/geohack.php?pagename=Hagia_Sofia&language=eo&params=41.008611111111_N_28.98_E_region:TR_type:landmark) (mapo)
Religia aliĝo	Islamo
Ŝtato	Turkio
Jaro de konsekro	26-an de decembro 537
Religia statuso	baziliko, moskeo
Funkcia statuso	muzeo
TTT paĝaro	https://muze.gen.tr/muze-detay/ayasofya
Arkitektura priskribo	
Arkitekto(j)	Isidoro Mileta

	Anthémios de Trall
Arkitektura stilo	bizanca arkitekturo
	Karakterizaĵoj
Kupolo(j)	1
Minareto(j)	4
Materialoj	marmoro, porfiro

En 1453, Konstantinopolo estis konkerita fare de Otomanaj Turkoj sub regado de la Sultano Mehmedo la 2-a, kiu ordonis, ke tiu ĉefa preĝejo de la Ortodoksa Kristanismo estu konvertita en moskeo. Je tiu epoko, la kirko estis falinta en stato de kadukiĝo. Tamen, ja la kristana katedralo ege impresis la novajn otomanajn regantojn ke ili ja decidis konverti ĝin en moskeo.[9][10] La sonoriloj, altaro, ikonostazo, kaj oferujoj kaj aliaj relikvoj estis translokigitaj kaj ankaŭ la mozaikoj kiuj priskribis Jezuon, lian patrinon Maria, kristanajn sanktulojn kaj anĝelojn estis forigitaj aŭ surfarbitaj. Islaman trajtoj - kaj la mihrabo, la minbaro, kaj kvar minaretoj - estis aldonitaj. Ĝi pluestis moskeo ĝis 1931, kiam ĝi estis fermita al la publiko dum kvar jaroj. Ĝi estis remalfermita en 1935 kiel muzeo fare de la Respubliko Turkio. Hagia Sofia estas nune (2014) la dua plej vizitata muzeo en Turkio, kaj allogas ĉirkaŭ 3.3 milionojn da vizitantoj ĉiujare.[11]

La 10-an de julio prezidanto de Turkio Recep Tayyip Erdogan ordonis transformi la bazilikon Hagia Sofia el muzeo je moskeo. Antaŭtage la supera kortumo verdiktis, ke ĝia muzeigo en 1934 estis kontraŭleĝa, do malvalida. La ago kaŭzis indignon kaj protestojn fare de ekleziaj kaj ŝtataj institucioj tutmonde.[12]

Tiu ĉi artikolo estas parto de serio de artikoloj pri Historio de arkitekturo.

Neolitika arkitekturo
Arkitekturo de antikva Egipto
Arkitekturo de Mezopotamio
Arkitekturo de antikva Grekio
Arkitekturo de antikva Romio
Hinda arkitekturo
Prakristana arkitekturo
Bizanca arkitekturo
Praromanika arkitekturo
Islama arkitekturo
Irana arkitekturo
Otomana arkitekturo
Romanika arkitekturo
Gotika arkitekturo
Renesanca arkitekturo
Novrenesanca arkitekturo
Baroka arkitekturo
Klasikisma arkitekturo
Arkitekturo de romantismo
Secesia arkitekturo
Moderna arkitekturo
Postmoderna arkitekturo

Rilataj artikoloj

Redaktu tiun ĉi ŝablonon (https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=%C5%9Cablono:Arkitekturo&action=edit)

El ties komenca konverto ĝis la konstruo de la najbara moskeo de la Sultano Ahmed (Blua moskeo de Istanbulo) en 1616, ĝi estis la ĉefa moskeo de Istanbulo. La bizanca arkitekturo de Hagia Sofia utilis kiel inspiro por multaj aliaj otomanaj moskesoj, kiaj ekzemple la Blua Moskeo, la Moskeo Şehzade, la Moskeo de Sulejmano, la Moskeo de Rustem Paŝa kaj la Moskeo de Kılıç Ali Paşa.

Enhavo

La estiĝo kaj evoluo de la konstruaĵo
Kristana periodo
Hagia Sofia en Esperanto
Vidu ankaŭ
Notoj

La estiĝo kaj evoluo de la konstruaĵo

Kristana periodo

Kiel **hipoteze** pli-malpli povus aspekti la katedralo nun, se ne la minaretoj estus aldonitaj pli ol 800 jarojn post la konstruo

Hagia Sofia nokte

Hagia Sofia estis konstruita je impulso de bizanca imperiestro Justiniano la 1-a kaj konsekrita la 26-an de decembro 537, kaj nome sur loko, kie jam antaŭe staris templo de sankta Sofio. Arkitektoj de la konstruaĵo estis Isidoro Mileta kaj Antemio de Tralles. Ĝis hodiaŭ ĝi estas la plej signifa memoraĵo de la bizanca arkitekturo, simbolo de la tuta Istanbulo. Sed malgraŭ tio jam en la jaro 558 ties kupolo dum tertremo frakasiĝis. Sekvis pluaj tertremoj en la jaroj 989 kaj 1346, sed tiuj jam ne havis tian pereigan efikon. La templo estis tiutempe ankaŭ rezidejo de konstantinopola patriarko. Post konkero de Konstantinopolo fare de la kvara krucmilito la templo de Dia Saĝeco estis sidejo de la latina patriarko konstantinopola.

Hagia Sofia en Esperanto

En la kvina kanto de la verko de Abel Montagut nome *Poemo de Utnoa* okazas asembleo de la Gobanoj (eksterteranoj). Tie oni akceptas, ke oni plikuraĝigu la malfortigitan Utnoan (nome la ĉefrolulo Noa) pere de la drogo *anoŭdo*. Inna malsupreniras kaj liveras ĝin al Noa. Je ties efiko aperas antaŭ li la poeto Valmikio kiu montras al li la enormajn atingojn de la estonta homaro, se li sukcesas savi ĝin, nome, en Azio, el Ĉina Murego al insulo Srilanko. Poste aperas la japana pentristo Hokusajo kiu siavice montras aliajn mirindaĵon el Azio. Kaj poste venas la vico de Fidiaso, kiu montras mirindaĵojn el suda kaj centra Eŭropo kaj la venonta ĉiĉerono estas Maria Sklodovska, kiu montros al Utnoa la mirindaĵojn de centra kaj orienta Eŭropo. Jen kiel ŝi prezentas Istanbulon kun ĉefa intereso al Hagia Sofia:

> Al Istambulo venas la vojaĝantoj alaŭde,
> miksejo de popoloj kaj verkoj bunte surprizaj,
> el kiuj, luksorname, elstaras Sankta Sofia.[13]

Vidu ankaŭ

- Otomana arkitekturo

Notoj

1. ↑ Müller-Wiener (1977), p. 112.
2. ↑ Magdalino, Paul, et al. "Istanbul: Buildings, Hagia Sophia" in Grove Art Online. Oxford Art Online. http://www.oxfordartonline.com. alirita la 28-an de Februaro 2010.
3. ↑ Fazio, Michael. (2009) *Buildings Across Time*, 3-a eldono, McGraw-Hill Higher Education. ISBN 978-0-07-305304-2.
4. ↑ Simons, Marlise, "Center of Ottoman Power (http://www.nytimes.com/1993/08/22/travel/center-of-ottoman-power.html)", *New York Times*, 22a de Aŭgusto 1993. Kontrolita 4a de Junio 2009.
5. ↑ Kleiner, Fred S.. (2008) *Gardner's Art Through the Ages: Volume I, Chapters 1–18*, 12-a eldono, Mason, OH: Wadsworth. ISBN 0-495-46740-5.
6. ↑ [6,0] [6,1] Janin (1953), p. 471.
7. ↑ McKenzie, Steven L.. (1998) *The Hebrew Bible Today: An Introduction to Critical Issues (https://books.google.com/books?id=owwhpmIVgSAC&pg=PA149&dq=%22Jesus+Christ+as+the+Holy+Wisdom+of+God%22#v=onepage&=%22Jesus%20Christ%20as%20the%20Holy%20Wisdom%20of%20God%22&f=false)*, M. Patrick Graham, Louisville, KY: Westminster John Knox Press. ISBN 0-664-25652-X.
8. ↑ Binns, John. (2002) *An Introduction to the Christian Orthodox Churches (https://books.google.com/books?id=MOA5vfSl3dwC&pg=PA57&dq=%22Its+dedication+to+the+Wisdom+of+God+identified+it+with+Christ%22#v=onepage&q=%22Its%20dedication%20to%20the%20Wisdom%20of%20God%20identified%20it%20with%20Christ%22&f=false)*. Cambridge: Cambridge University Press. ISBN 0-521-66738-0.
9. ↑ [1] (http://www.livescience.com/27574-hagia-sophia.html)." LiveScience.
10. ↑ "Hagia Sophia (http://archnet.org/library/sites/one-site.jsp?site_id=2966)." ArchNet.
11. ↑ "Top 10: Turkey's most visited museums (http://www.hurriyetdailynews.com/top-10-turkeys-most-visited-museums.aspx?pageID=238&nID=74133&NewsCatID=385)", *Hürriyet Daily News*, 10a de Novembro 2014.
12. ↑ https://eo.wikinews.org/wiki/Turkio_transformis_Hagia_Sofia_je_moskeo
13. ↑ Abel Montagut, *Poemo de Utnoa*. Pro Esperanto. Vieno, 1993. ISBN 3-85182-007-X. 225 p., p. 121.

Moskeoj en Turkio

Istanbulo Arap Moskeo • Atik Ali Pasha Moskeo • Atik Mustafa Pasha Moskeo • Atik Valide Moskeo • Bayezid II Moskeo • Bodrum Moskeo • Defterdar Moskeo • Dolmabahçe Moskeo • Eski Imaret Moskeo • Eyüp Sultan Moskeo • Fatih Moskeo • Fenari Isa Moskeo • Firuz Ağa Moskeo • Gül Moskeo • Hagia Sofia • Handan Agha Moskeo • Hirami Ahmet Pasha Moskeo • Imrahor • Kalenderhane Moskeo • Kara Ahmet Pasha Moskeo • Kariye • Kefeli Moskeo • Kılıç Ali Pasha Complex • Koca Mustafa Pasha Moskeo • Küçük Mecidiye Moskeo • Laleli Moskeo • Little Hagia Sophia• Manastır Moskeo • Mihrimah Sultan Moskeo (Edirnekapı) • Mihrimah Sultan Moskeo (Üsküdar) • Molla Çelebi Moskeo • Muhammad Maarifi Moskeo • New Moskeo • Nuruosmaniye Moskeo • Nusretiye Moskeo • Ortaköy Moskeo • Pertevniyal Valide Sultan Moskeo • Rum Mehmed Pasha Moskeo • Rüstem Pasha Moskeo • Şakirin Moskeo •

aliaj areoj	Sancaktar Hayrettin Moskeo • Şehzade Moskeo • Şemsi Pasha Moskeo • Şeyh Süleyman Moskeo • Sinan Pasha Moskeo • Sokollu Mehmet Pasha Moskeo • Moskeo de Sulejmano • Blua moskeo • Teşvikiye Moskeo • Vefa Kilise Moskeo • Yavuz Selim Moskeo • Yeni Valide Moskeo • Yıldız Hamidiye Moskeo • Zal Mahmud Pasha Moskeo • Zeynep Sultan Moskeo • Zeyrek Moskeo Bayezid I Moskeo • Bursa Grand Moskeo • Divriği Great Moskeo • Emir Sultan Moskeo • Eşrefoğlu Moskeo • Granda Moskeo de of Diyarbakır • Hacı Özbek Moskeo • İsa Bey Moskeo • Kazdağlı Moskeo • Kocatepe Moskeo • Laal Pasha Moskeo • Muğdat Moskeo • Murat Paşa Moskeo • Nasrullah Moskeo • Old Moskeo • Omer Pasha Moskeo • Sabancı Moskeo • Moskeo de Selimo • Tekeli Mehmet Paşa Moskeo • Üç Şerefeli Moskeo • Ulucami • Ulu Camii (Adana) • Yağ Camii • Yeşil Moskeo

---

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Hagia_Sofia&oldid=7000500"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 21:32, 26 jul. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.